Matthew Gregory Lewis ,

# Ĉe la bordo de Alano

*tradukita de W. M. Page*

Ĉe la bordo de Alano
estis en printempa hor'
la filin' de muelisto
bela, kiel flor'.
Amindumis ŝin soldato;
dolĉajn vortojn diris li -
Ĉe la bordo de Alano
gaja estis ŝi.

Ĉe la bordo de Alano,
post forpaso de l'somer',
la filin' de muelisto
staris sen esoer'.
Ĉar forestis la soldato,
malfidela estis li -
ĉe la bordo de Alano
ĉiam ploris ŝi.

Ĉe la bordo de Alano,
en malvarma vintra hor',
al filin' de muelisto
ekrompiĝis kor'.
For de zorgo kaj malvarmo
per la morto pasis ŝi;
al la bordo de Alano
ne plu venos ŝi.

*Traduko de la Angla poemo "Banks of the Allan Water" de* Matthew Gregory Lewis *(∗1775-07-09 – †1818-05-14) en Esperanton de W. M. Page.*

*Arg-1020-2065 (2014-05-22 15:06:23)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio; sur la paĝoj 49 kaj 50. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo* `http://kantaro.ikso.net/cxe_la_bordo_de_alano`.

Matthew Gregory Lewis ,

# Banks of the Allan Water

On the banks of the Allan Water,
When the sweet springtime did fall,
Was the miller's lovely daughter,
Fairest of them all.
For his bride, a soldier sought her
And a winning tongue had he,
False was he.
On the banks of the Allan Water
So misled was she.

On the banks of the Allan Water
When the autumn spread its store
There I saw the miller's daughter
But she smiled no more,
For the summer, grief had brought her
And the soldier, false was he,
On the banks of the Allan Water,
Left alone was she.

On the banks of the Allan Water
When the winter snow fell fast
Still was seen the miller's daughter
Chilling blew the blast.
But the miller's lovely daughter,
Both from cold and care was free,
On the banks of Allan Water,
In a grave lay she.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* Matthew Gregory Lewis *(∗1775-07-09 – †1818-05-14).*

*Arg-1020-2064 (2014-05-22 14:55:14)*

*Tiu ĉi origina kanto-versio troviĝas en* `http://sangstories.webs.com/banksofallanwater.htm`. *Vidu ankaŭ:* `http://www.contemplator.com/folk.html` *kaj* `http://www.traditionalmusic.co.uk/song-midis/Banks_of_Allan_Water.htm`. *La kanto estas aŭdebla en* `http://www.contemplator.com/folk.html`. *Pri la verkinto de la kanto vidu la retejon* `http://sangstories.webs.com/banksofallanwater.htm` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Matthew_Gregory_Lewis`.